

flamiga tensio A. *ignition voltage*; F. *tension d'amorçage*; G. *Zündspannung*.

indukelektra generatoro produktas elektron per (elektrostatika) induko; F. *machine à influence*; A. *influence machine*; G. *Influenzmaschine*.

nuliga tensio elektra tensio kompensanta iun fizikan grandon.

optika stablo A. *optical bench*; F. *banc optique*; G. *Optische Bank*.

poe pofoje, po unuo; samsignifa kun la Fundamenta „po”; laŭ iama propono de d-ro Wüster.

prismaro kun rekta vidado A. *direct vision prism*; F. *prisme à vision directe*; G. *Geradsichtprisma*.

specialigo apliko de ĝenerala teoremo aŭ formulo al unuopaj kazoj.

spektrografo aparato por fotografi spektrojn.

Historiaĵo

Tempo	Persono
1887	Henriko Hertz observas la influon de lumoj je transsalto de sparkoj.
1888	Hallwachs malkovras la lumoelektran fenomenon.
1900	Planck klarigas la energidistribuon en la nigra radiaĵo per la hipotezo de la kvantumoj.
1905	Einstein aplikas tiun hipotezon al la lumoelektra fenomeno.
1914	Franck kaj Hertz pravas la kvantumecan transdonon de la kinetika energio de elektronoj al Hg-atomoj kaj ĝian postan kvantumecan transformiĝon en radiadon.

1) *Scienca Revuo* 6 91. 2) S.R. 6 3. 3) S.R. 9 41. 4) *Elektitaj Prelegoj*, Muusses, Purmerend 1955. 5) S.R. 10 6) S.R. 8 122. 7) 1 nm (nanometro) = 1 m μ = 10⁻⁹ m. 8) Post mia prelego atentigis min la eminenta esperantologo kaj teknikisto Ing. A. Warner pri sia artikolo „Benennungen physikalischer Größen (Terminoj por fizikaj grandoj) dume aperinta en la novembra n-ro de „Muttersprache” Lüneburg, vol. 68, 1958, en kiu li konstatas, ke kelkaj terminoj signifas fenomenon kaj fizikan grandon pri tiu fenomeno. Por eviti konfuzon li proponas por germanlingvaj terminoj de novaj grandoj la sufikson „-nis” resp. „-anz” laŭ jena modelo: „Wirkung” - „Wirknis”; „Polarisation” - „Polarisanz”. En Esperanto ekzistas la sama problemo, kiun solvus la internacia sufikso „-anc”. Do, anstataŭ preni la neologismon „akciono”, oni derivu el „ag” la terminon „aganco”.

Al mi ŝajnas necese esplori la tutan demandaron estigotan per enkonduko de la scienca sufikso „-anc” antaŭ ol konsili la akcepton de la vorto „aganco”.

9) La firmao Leybold evoluigis tiun lumopilon en kunlaboro kun la firmao Pressler al porprelega aparato, kiu ebligas la determinadon de la Plancka konstanto *h*. La aparato estas aĉetebla ĉe la firmao Leybold, Köln-Bayental, Germanujo, Okcidenta zono.

10) Pliaj informoj pri la aparato, kiu permesas precizan mezuron bezonante por la amplifado nur teknikan alternan tension, estas riceveblaj de la firmao Leybold. Al ĝi mi dankas la subtenon de mia prelego per ĉiuj necesaj aparatoj.

11) Franck kaj Hertz. *Berichte der Deutschen Physikalischen Gesellschaft* 16 457 (1914).

VORTOJ EL LA FUNDAMENTO DE ESPERANTO EKSTER LA ALFABETVICO DE LA UNIVERSALA VORTARO

Tasko decidi, ĉu ĉiuj vortoj de la *Fundamento de Esperanto*, aŭ almenaŭ iliaj radikoj, estas fundamentaj, apartenas al la Akademio. Cetere la Akademio laste decidis pri tiu punkto per 7a Oficiala Aldono. Ni tamen povis konstati, ke restas diferencoj inter la stato de tiu Aldono kaj la listo de vortoj kiuj meritintus eniri en ĝin.

La „kulpulo” estas Wackrill, kiu en sia „Konkordanco al la Ekzercaro” sisteme forlasis el la alfabetvico diversajn radikojn entenatajn nur en kunmetaĵoj. Krome li ne atentis la ekzemplojn aldonitajn en la vortlistoj, kiuj sekvas tiujn ekzercojn. Tiuj listoj tamen estas interesaj, ĉar ili ne estas nuraj kopioj el la *Universala Vortaro*: ekzemple la radikoj tie ne kuŝas nudaj, sed surhavas karakterizan finaĵon.

En la ĉi-sekva listo, mi notis ĉiujn radikojn, kiujn mi trovis en la *Fundamento de Esperanto* (Oka Eldono, 1931), sed kiuj ne kuŝas alfabetvice en la *Universala Vortaro*. Mi esperas, sed ne pretendas, esti forgesinta nenion.

Ĉiun radikon mi 1^e) antaŭigas de indiko pri la eventuala *Oficiala Aldono* kie ili jam troviĝas (1: 1-a O.A.; 1*: same, sed kun indiko tie pri zamenhofeco: kelkaj ne estas indikitaj kiel zamenhofaj!! — 2a, 2b: 2-a O.A., 1-a kaj 2-a partoj — 7a, 7b, 7r: 7-a O.A., 1a kaj 2-a partoj, Rimarko 1-a).

2^e) sekvigas de indiko pri la trovloko en la *Fundamento de Esperanto*, laŭ jena listo:

A *Antaŭparolo*.

G *Gramatiko* (numero de la paragrafo: ekz. G2; eventuala indiko de la kvin partoj per: f, a, g, r, p, se la radiko ne aperas en ĉiuj kvin. Ekz. G13f: nur en la 13-a paragrafo de la franca parto.)

E *Ekzercaro* (plus numero de la ekzerco). E0 = titolo de la Ekzercaro (sub tiu nomo, mi komprenas la surskribon: *Ekzercaro de la lingvo internacia „Esperanto”*, (p. 31, 8-a Eld.) kaj ankaŭ la surskribon sur p. 29, kompletigitan jene: ... *kun tradukoj en franca, angla, germana, rusa, pola lingvoj*. Tamen, ĉar ŝajne tiu kompletigo ne estas en ĉiuj eldonoj, estas dube ĉu ĝi estas origina aŭ aldona. Tial por la vortoj koncernitaj ni notas E0, sed inter krampoj.)

L listo post la ekzerco (EL 25 = 25-aj ekzerco kaj listo.)

T titolo kaj enkonduko de la *Universala Vortaro*.

O radikoj el kunmetaĵoj alfabete ordigitaj en la U.V.

K radikoj el ekzemploj en la korpo de U.V.

(Post O kaj K sekvas la radiko, ĉe kiu oni serĉu en U.V.)

Mi forlasis la alfabetliterojn (E1), same kiel la ekzemplojn de kares-nomoj formitaj per *ĉj* kaj *nj* (E38, K(ĉj, nj)).

1*, 7a	absolut'	A	1*, 7a	fi!	EL26
1*	adres'	E42, A	1*, 7a	fizik'	EL32
1*, 7a	aktiv'	E29	1*, 7a	fotograf'	E32
7r	Aleksandr'	E9, K(ĉj)	7b	franc'	(E0), EL37, T
1*, 7a	alfabet'	E1	1*	frank'	E14
7b	angl'	(E0), T, A	1*	general'	K(moŝt)
7b	Ann'	E36	1*	geografi'	E3
7b	Anton'	E10	7b	Georg'	E12
7a	arĥaism'	A *1)	7b	german'	(E0), EL34, T
7b	Aŭgust' (vir-nomo)	E22	7b	hebre'	EL36
1*, 7a	aŭtor'	A	7r	Henriet'	K(nj)
1*, 7a	aŭtoritat'	A	1*, 7a	ide'	T, A
1*, 7a	bal'	E2	1*, 7a	instituci'	A
7b	Berlin'	E39	7r	Izrael'	L36, K(id)
7b	Bert'	E39	7r	Johan'	E8, 38, K(ĉj)
7b	Bulonj'	A	7r	Jork' (Nov-)	L37, K(an)
1*, 7a	centim'	E41	7b	Jozef'	E22
1*	centr'	A	(1*), 3	jur'	E2, 4 *3)
7a	ĉial	E30	1*	jurnal'	E2
7a	ĉies	E30	7b	Kalvin'	E37
7a	ĉiom	E30	1*	kilogram'	K(da)
1*, 7a	diplomat'	E32	1*, 7a	kilometr'	E32
7a	diplomati'	E32	7b	Klar'	(virinnomo) E38
2a, 7a	dogm'	A	1*, 7a	kompetent'	A
1*, 7a	doktor'	EL36	1*, 7a	kongres'	A
1*, 7a	dokument'	A	1, 7a	kontrol'	A
7b	Elizabet'	E36	1*, 7a	kopek'	E41
7r	Emili'	K(nj)	1*, 7a	literatur'	A
1*, 7a	energi'	E37, A	7b	London'	G13a
7b	Ernest'	E10, 38	7b	Ludovik'	E8
7b	Esperant'	E0, 22, T, A *2)	7b	Luter'	E37
7b	Eŭrop'	E3	7r	Mari'	E38, (K(nj))

*1) Estus nun dismetebla kiel *arĥa'ism'* apud: *angl'ism'*, *franc'ism'* kaj ĉiuj aliaj *idiom'ismoj* (ŝajne preferinda al *idiotism'o*). Tiam la neologismo *arĥa'* ricevas la signifon de *arkaik'*.

*2) Vera radiko pluformanta memstarajn derivaĵojn. Cetere S-ro Ing. J. R. G. Isbrucker skribas: „Mi opinias, ke ni havas la rajton konsideri „*Esperant'*” kiel apartan radikon, kiun ni eĉ ĉiam skribu kun majusklo, eĉ en kunmetaĵoj.”

*3) Ĉar ankaŭ *-ist* estas fundamenta, mi vidas absolute nenium motivon por ne dismeti *jurist'* al *jur'ist'* kaj ne konsideri *jur'* kiel fundamentan. (*jurist'* estas en la Unua O.A., dum *jur'* estas en la Tria.)

1*	material'	EL31	7b	rus'	(E0), EL16, T
1	metal'	O(faden)	1*, 7a	sankci'	A
1*, 7a	metr'	E14, 32	1*, 7a	scen'	E2, 4
7r	Mihael'	K(ĉj)	1*, 7a	sistem'	E3
2a, 7a	milion'	E14	7b	Sofi'	E38
1*, 7a	naiv'	EL17	1, 7a	sofism'	E3, 4
	nen-	E30 *4)	1*, 7a	special'	EL19, A
7a	nenial	E30	1b	Stefan'	E18
7a	neniom	E30	1*, 7a	sufiks'	EL30
7b	Nikodem'	E22	7b	Ŝiller'	G16fagp
7b	Nikola'	E38	1*, 7a	teatr'	G15agrp, EL32
1	oficial'	A	1*	tekst'	A
2a, 7a	paradoks'	A	1*, 7a	telegraf'	E36
1*, 7a	paralel'	A	7b	Teodor'	E5
7b	Pariz'	G13f, E28, 37	1*, 7a	teori'	E3
1, 7a	patent'	E3	7a	ties	E30
(7b)	Paŭl'	E3 *5)	1*, 7a	tragedi'	G15f
7b	Petr'	E18	7r	turk'	L20, K(uj)
1*, 7a	pfenig'	E41	1*, 7a	valor'	A
7b	pol'	(E0), EL27, T	7r	Varsovi'	G13grp, L37, A, K(an)
1, 7a	prefiks'	EL30	7b	Vaŝington'	E12
1*, 7a	princip'	A	7b	Vilhelm'	E38
2b, 7a	projekt'	EL25	1*, 7a	zoologi'	E3, 4
1*, 7a	rezultat'	EL42			

Se nun ni komparas la supran liston kun la Sepa O.A., ni konstatas, ke el tiu Aldono forestas 12 radikoj (plus „*nen*”) presitaj ĉi-supre, dum enestas unu troa: *geograf'*, preseraro por *geografi'* de nia listo. Ni aparte kontrolis en du malsamaj alilingvaj eldonoj de la Fundamento: ambaŭ havas: „*geografio*”.

KONKLUDOJ: La Akademio devos decidi pri la fundamenteco de tiuj 12 radikoj: 10 el ili estis forgesitaj (*adres'*, *centr'*, *frank'*, *general'*, *jurnal'*, *kilogram'*, *material'*, *metal'*, *oficial'*, *tekst'*).

— 1 estas preseraro: *geografi'* anstataŭ la nefundamentan *geograf'*.

*4) Vidu la Zamenhofan tekston: „Aldonante la prefikson „*nen*”, ni ricevas vortojn neajn: *nenia*, *nenial* ...” Tiu vortparto fakte neniam estis uzata kiel efektiva prefikso aŭ memstara radiko kaj S-ro Isbrucker kaj Prof. Waringhien ambaŭ opinias ĝin neakceptinda: („Mi kredas, ke prefikso „*nen*” ne estas akceptinda. Se Zamenhof nomis ĝin prefikso, li certe faris tion en la ĝenerala senco de „antaŭmetaĵo” kaj ne en tiu de gramatika parto de vorto.” J. R. G. Isbrucker. ... „Mi ne opinias, ke oni povus vere oficialigi la prefikson „*nen*”, kiu neniam ĝis nun estis uzata (kvankam proponata en la Plena Gramatiko!” Prof. G. Waringhien.)

*5) Dismetita el *Paŭlino*. Ankaŭ ĉi tie ne estas motivo konsideri nur la derivaĵon kiel fundamentan. La Sepa O.A. donas: *Paŭlin'*.

— Restas *jur'* el *jurist'* de la Ekzercaro. Kiu el ambaŭ estas fundamenta?

La opinioj malsamas: S-ro Inĝ. J. R. G. Isbrucker skribas: „Estas vere, ke ni povas konsideri „*juristo*” kiel kunmetaĵon de „*jur'*” kaj „*-ist'*”, kaj tiam fakte „*jur'*” estas jam fundamenta.” ... Sed Prof. G. Waringhien diras: „*jurist'*” ne devas esti analizita en „*jur'*”: tre certe, en la ideo de Z. tio estis unu „fremdvorto” kiu estis malkomponita nur poste, kaj ne de Z. mem.”

Andreo ALBAULT.

408.92

E 3-5 : E 82E

LA ĜUSTA TEKSTO DE LA EKZERCARO

Komparante la tekston de la *Ekzercaro* entenata en la oka eldono de la *Fundamento* (1931) kun la teksto entenata en Wackrill (*Konkordanco al la Ekzercaro*, 1907), mi konstatis ke estas kelkaj diferencoj inter la du tekstoj: mi notis naŭ el ili. Ili estas tre diversaj en sia graveco, sed ĉiuj povas helpi por fiksi la ĝustan tekston.

Por ĉiu el tiuj naŭ diferencoj mi komparis kun la tekstoj liveritaj de du aliaj eldonoj de la *Fundamento*: la Greka (1907) kaj la Itala (1907).

Jen, koncize, la rezulto de tiu esploro. (Mallongigoj uzitaj:

8 = Oka Eldono de la *Fundamento*; W = Wackrill; G = Greka eldono; I = Itala eldono.

12-a ekzerco. 17-a frazo.

dudek sepa (8, G) *dudek-sepa* (W, I) (preferinda)

18-a frazo:

dudek dua (8, G) *dudek-dua* (W, I) (preferinda)

mil sepcent tridek dua (8, G, W) *mil-sepcent-tridek-dua* (I) (preferinda)

14-a ekzerco. 5-a frazo:

miljaron (W, G, I) *jarmilon* (8)

22-a ekzerco. 1-a frazo:

pura, ol akvo staranta (8, G, I) *pura, ol akvo, staranta* (W) (malbona)

33-a ekzerco. 8-a frazo:

Ni forte malestimas (8) *Mi forte malestimas* (W, G, I)

36-a ekzerco. 7-a frazo:

miaj frato kaj fratino (8) *mia frato kaj fratino* (W, G, I) (malbona)

(„*miaj*” estas grase presita en 8; „*mia*” estas ordinare presita en W, G, I.)

41-a ekzerco. 6-a frazo:

nekredeblan (8, G) *ne kredeblan* (W, I)

42-a ekzerco. 12-a frazo:

sanigilo, resanigi (8, G) *sanigilo, sanilo, resanigi* (W, I) (bona)

Andreo ALBAULT.

INDEKSO por Vol. 1-10 de *Scienca Revuo* laŭ BDK *)

de M. C. BUTLER

ENKONDUKO

Jen laŭpete indekso (laŭ mia *Klasifo de Esperantaj Temoj*) de artikoloj en *Scienca Revuo* (Volumoj 1-10).

Por ĝin kompreni aŭ kritiki, necesas sin turni al la klarigoj en la verko mem (pp. 3-7, 133-140), aŭ minimume al la klarigoj donitaj en S.R. 1 108 kaj 8 98. Ilin mi ne ripetos ĉi tie.

Devante klasifi tre detale 50 000 erojn por la Esperanta Biblioteko de la B.E.A., mi trovis kaj UDK kaj ĝian Sebertan modifon tute neadekvataj, kaj la proponitajn indicojn neoportune - eĉ ridinde - longaj kaj nepraktikaj. Cetere, por mil kaj unu detaloj ili faris nenian ajn provizon. Dum 40 jaroj mi do grade ellaboris la nunan klasifon.

Mi sekvis Seberton [laŭ lia *Modela Klasifiko* (pp. 6, 14, 18, 19) akorde kun la publikaĵo 91 (1908) de la Int. Instituto de Bibliografio], uzante 41 *internacia lingvo*, kaj 81 *internacilingva literaturo*. Por demandoj gramatikaj Dewey montriĝis pli taŭga bazo ol UDK. Mi nun rimarkigas simple:

(1) Por Esperanta lingvo kaj literaturo la precizaj indicoj estas = 12 kaj 812. Tamen, en la praktiko, = 1 kaj 81 plene sufiĉas. [Se iam ekzistus originala literaturo en alia i.l., la necesaj indicoj estas provizitaj.]

(2) 5 ŝajnas pli oportuna ol 001 por „scienco” (ambaŭ estas kritikeblaj, kiel tro aŭ nesufiĉe ampleksaj).

(3) Mi provizis indicojn uzeble koncizajn, tamen detalajn kaj klarajn. Ekz., por Teknikaj Terminoj en Esperanto, E 28 (anst. 001.4 = 089.2); por UEA, E 066 (anst. = 089.2 = 061.238 (100)); por *Scienca Revuo* 5(05)SR (anst. 001(05) = 089.2(100)). (Kiel meti tiun kombinaĵon surdorse de volumo?)

(4) La Biskosignoj (Klasifo p. 14) montriĝis tre oportunaj por ĉion ordigi laŭ dato de eldono. Ekz., E „1902” S4 = E en 1902 (verko eldonita en 1924). Tamen, ĉar ili ne provizas por datoj post 1999, oni povas ilin pridubi.

(5) Kompreneble estas dezirinde, ke ĉiuj bibliotekoj uzu UDK same. Mi ne proponas modifon de UDK, sed nur, por *Esperantaj Bibliotekoj*, klasifon detalan kaj adekvatan por temoj alie neklasifeblaj.

(6) Kiu do insistas konservi UDK tute senŝanĝe, povas agi kiel montrite ĉe *Klasifo* p. 7.

*) Ĉi tiu listo ne pretendas kompletecon.